

Wilhelm Müller,  
Sur la rivero

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Tre gaje susurinta  
River' sovaĝa vi,  
Kalmiĝis vi, ne diras  
Adiaŭ vi al.mi.

Kovrite per malmola,  
Rigida ŝelo en  
Sablej' malvarma kuŝas  
Vi nun senmove jen.

Enskrapas mi la nomon  
De mia karulin',  
La tagon kaj la horon  
Enskribas mi sur vin:

La tagon, kiam ekvidis  
Kaj adiaŭis mi ŝin,  
Kaj ĉirkaŭ ambaŭ turnas  
Rompita ringo sin.

*Traduko de la Germana poemo "Auf dem Flusse" de WILHELM MÜLLER (\*1794-10-07 - †1827-10-01) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2007-01-27.*

*MR-452-2 / Arg-805-1615 (2013-01-31 21:04:03)*

*Pri la poeto vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Wilhelm\\_M%C3%BCller](http://eo.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_M%C3%BCller).*